Espéranto Angers

# La Letero

2019 - 03

**Notinda en viaj agendoj**

## Dimanĉon la 28-an de aprilo 2019 en Anĝevo
## Tago pri "Humuro kaj Esperanto"

**HE!**

**HUMURO ESPERANTO**

**ANGERS - 2019**

*distraĵoj, prelegoj, muziko...*

**PROGRAMO**

**9h-9h30 :** Akcepto

**9h30 :** "*Humuro en la verko de Hergé*"
far Michel DECHY

**11h :** "Kial "*Tinĉjo en Tibeto" estas la preferata albumo de Hergé"*
far Michel DECHY

**12h :** "*Hägar Dünor*"
far Christian RIVIÈRE

**12h30-14h :** Bufedo surloke

**14h :** "*Esperantigi humuraĵon...*"
*(en kanzonoj, poezioj kaj teatraĵoj)*
far Serge SIRE kaj Jacques LE PUIL

**16h30-17h :** Amika kuntrinkado

Loko : Salono Paul Bert, rue Edgar Quinet - Angers

**Pliaj informoj en nia retejo : esperanto-angers.fr**

## Ĝenerala Kunveno de la 2-a de marto 2019



Kiel ĉiujare, la Jarkunveno de Esperanto-Angers okazis en la centro Jean Vilar, kun ĉeesto de ĉirkaŭ 20 partoprenantoj. Tio estis okazo por rektaj diskutoj pri la pasintaj kaj estontaj aktivaĵoj inter la membroj kaj la komitatanoj. La partoprenantoj ankaŭ povis konsulti kaj aĉeti kelkajn librojn el la libroservo kaj el la brokantaĵoj.

La membraro elektis novan komitaton kaj decidis starigi malaltan kotizon je 11eŭroj por tiuj kiuj havas ''etan buĝeton''. La normala kotizo restas je 22 eŭroj.

La jaron 2018 markis malfermo de 3-a kurso, por komencantoj, en la kvartalo "La Roseraie", kaj ankaŭ la jaro 2019 bone anonciĝas : la novaĵletero "*La Letero*" nun refoje aperas regule ĉiumonate. La 2353 libroj de la biblioteko ekde nun estas konsulteblaj kaj prunteprenenblaj de la membroj.
(kontakto : **biblioteko@esperanto-angers.fr** )

Inter la estontaj aktivaĵoj dumkunvene pridiskutitaj, notindas la baldaŭa organizo de tago "Humuro kaj Esperanto", en Angers la 28-an de aprilo (legu ĉi-supre).
La posttagmezo finiĝis per gustumado de la tradicia reĝkuko.

Espéranto-Angers - 3 allée du Haras, Appt 132, 49100 Angers, France
Tél. +33 (0)2 41 20 19 40 - http://www.esperanto-angers.fr - info@esperanto-angers.fr